sciencistoj scipovas la internacian lingvon, serĉi aplikojn de ĝi, kiuj havas tujan avantaĝon, ĉar tiamaniere ni povas akceli ĝian vastan uzadon, eĉ se tia apliko ŝajnas esti devojigo de la ideo de internacia lingvo. Unu tia apliko de Esperanto estas kiel interlingvo aŭ pontlingvo ĉe maŝina plurlingva tradukado.

Ĉe plurlingva tradukado oni bezonas nur unufoje traduki en la interlingvon ekzemple per homa tradukisto kaj povas poste traduki per maŝino en la necesajn aliajn lingvojn. Verŝajne Esperanto ne estas la plej ideala lingvo por tiu celo, sed ĝi havas grandajn avantaĝojn pro sia strukturo kompare kun naciaj lingvoj, kaj kompare kun konstruotaj tiaj pontlingvoj ĝi havas la avantaĝon, ke ĝi estas jam ekzistanta, kaj ke niaj multjaraj spertoj montris ĝian taŭgecon por komunikiĝo pri ĉiuj diversaj homaj aktivecoj.

La prostrukturaj avantaĝoj de Esperanto ĉe tiu ĉi apliko estas i. a.:

1) ĝia simpla morfologio kaj afiksa vortformado
2) ĝia malofteco de plursignifaj vortoj kaj idiomoj
3) ĝia logika sintakso.

Similigita proveto de tia tradukado de Esperanto en la germanan lingvon estis tre esperiga.

La prelegonto partoprenis en la fino de julio 1962 dusemajnan kurson pri maŝina tradukado en Venezia kaj prelegos pri siaj tieaj spertoj. Antaŭsciata sperto de tie estas, ke la proponita apliko de Esperanto nur estos realigita de ni Esperantistoj mem. Sed mi kredas, ke laboro de Esperantistaj fakuloj sur tiu kampo povas esti tre utila por nia movado kaj por la scienco.

681 : 177.7 : (083)' 408.92

MULTLINGVAJ VORTAROJ PER ESPERANTO KIEL SISTEMLINGVO KAJ PER APLIKO DE HOLLERITH-MAŜINOJ

de G. Natalis

En la internacia interkomunikado ekzistas malfacilaĵoj i. a. ĉe tradukoj de komplikaj teknikaj esprimoj kaj ĉe farado de novaj vortoj.

Por faciligi tradukojn, oni uzas vortarojn kaj vort-katalogojn, kiuj estas ordigitaj laŭ vortspeco aŭ laŭ kieloj (vidu pri-tiu malsupre).

Vortojn mane grupigi al nocioj aŭ al kieloj estas dubega pro la eksterordinara amplekso de la laboro kaj pro la grandaj erareblecoj per tiu metodo. Pro tio oni uzu avantaĝe procedojn, kiuj faras la necesajn ordigkaj skriblaborojn maŝine.

Kiel inform-konserviloj estas uzataj trukartoj. Ili estas paperaj kartoj de la formato 18,7 cm × 8,3 cm. En ĉi tiuj kartoj la prilaborendaj informoj estas truitaj.

La farado de plurdimensiaj vortaroj estas ĉitie priskribita kun la lingvoj Esperanta, Germana, Angla. La sistemvorto estas la Esperanta. Al ĝi estas ordigitaj la Germana kaj la Angla tradukoj:

(bildo 1)

La nocioj:

Vortspecoj (Substantivo, pronomo, adjektivo. . .)
Kielo (Aparteneco de la vorto al faka vortsekcio)
Esperanta distingilo (Fundamento aŭ oficiala vorto)

Per maŝinaj ordigoj de la trukarta kartoteko laŭ la unua indikita lingvo kaj sekvonta tabeligo oni povas fari la diversajn vortarojn ĉiam el la sama kartoteko:



(bildo 2)

Krom la menciitaj aroj, ankaŭ precipe elektitaj aroj ebliĝas ekzemple:

1) Vortoj laŭ vortspecoj (substantivoj, ... , interjekcioj)
2) Vortoj laŭ enhava nocio: bestoj, plantoj, tempoj, ktp.
3) Vortoj, kiuj ne apartenas al la Fundamento, tamen agnoskitaj de la Akademio
4) Vortoj, kiuj apartenas al la Fundamento kaj kiuj rilatas tekstilaĵojn kaj kiuj estas ordigitaj en leksikona maniero ktp., ktp.

002.6 : 621.38

AUTOMATISMA DOKUMENTADO DE SCIENCA, TEKNIKA KAJ KOMERCA LITERATUROJ PER APLIKO DE TELETAJPILOJ, HOLLERITH-MAŜINOJ KAJ ELEKTRONAJ KALKULMAŜINOJ

de H.-D. Neumann

Internacia scienca, teknika kaj komerca literaturoj tre urĝe bezonas lingvon, kiu taŭgas por aŭtomatisma dokumentado.

Pomonate la literatura aro ampleksas proksimume inter 2000000 ĝis 20000000 gazetajn, revuajn, patentajn publikaĵojn, sciigojn, ktp.

ĈI tiu grandaro ne plu estas laborebla mane, sed ankoraŭ nur maŝine.

Sugesto: Esperanto estas ĝis nun la nura taŭga lingvo por elektronaj maŝinoj pro:

a) la neŝanĝebleco de vortradikoj ĉe la diversaj vort- kaj tempformoj,

b) la logika gramatiko,

c) la klaraj difinitaj finaĵoj kiel -o, -is, -as, ktp.

Postulo: Ĉi tiun eblecon bedaŭrinde kontraŭagas la supersignoj. ili tute ne taŭgas por ĉiuj modernaj maŝinaj informiloj kiel: teletajpiloj, Hollerith-maŝinoj, elektronaj kalkulmaŝinoj kaj multaj aliaj.

Pro tio oni devas trovi la eblecon por forigi la supersignojn.

(Literatur-indikoj: »Chemicle Titles« Aŭtomatisma dokumentada servo de Chemical Abstracts US.

»AEDA« Gmelin-Institut, Germanujo — Maŝina dokumenta servo pri atomenergio)

III

Juro

Ivo Lapenna* 401 : 340/341

KELKAJ ASPEKTOJ DE LA LINGVA PROBLEMO en INTERNACIA PUBLIKA JURO KAJ KOMPARA JURO

I. Internacia Juro

(1) **Lingvoj uzataj.** — La fondintoj de la moderna scienco de Internacia Juro uzis la latinan, kiu estis, kiel montrite aliloke[1], la lingvo de la tiamaj interŝtataj rilatoj. La ĉefaj verkoj de tiu frua epoko **Relectiones de Indis Noviter Inventis** (1532) de la hispano Vitoria; **De Legatioribus** (1588).**Commentationes de Jure Belli** (1589) kaj **De Jure Belli Libri Tres** (1598) de la italo Gentili, kiu vivis en Anglio kaj fariĝis profesoro en Oxford; **Mare Clausum (1618)** de la anglo Selden; **Mare Liberum** (1609), **De Jure Praede** (1605) kaj la mondfama **De Jure Belli ac Paccis Libri Tres** (1625) de la nederlandano H. Grotius, la plej granda el ĉiuj, kaj aliaj estis verkitaj en la latina. Superflue emfazi la avantaĝojn, kiujn donis la uzo de unu sola komuna lingvo por scienca branĉo plej esence internacia. Paralele kun la malaperado de la latina en la Internaciaj rilatoj, ĝi malaperis ankaŭ el la doktrino. Multnombraj, praktike ĉiuj naciaj literaturaj lingvoj de la mondo anstataŭigis ĝin en la nuntempo.

(2) **Problemoj.** — Ĉu la miltlingveco sur tiu ĉi kampo kaŭzas malfacilaĵojn kaj, se jes kiujn?

---

*) *D-ro de juro, estinta profesoro de la Internacia Juro kaj Internaciaj Rilatoj en la Universitato de Zagreb; nun »Research Fellow« en The London School of Economics and Political Science de la Universitato de Londono.*

[1]) Vidu la studon pri »La Lingva Problemo en Internaciaj Rilatoj«.